

Resumo

Laŭ la leĝo pri komunumoj n-ro 367/1990 de “Kolekto de leĝoj” ĉiuj civitoj (urboj kaj vilaĝoj) havas la rajton posedi propran blazonon kaj flagon, sekve la civitoj, kiuj tiujn ĉi simbolojn ne posedas, havas rajton ilin akiri. La proponojn de la civitoj pritraktas la Subkomitato por la heraldiko kaj veksilologio de la Komitato por la scienco, edukado, kulturo, junularo kaj korpa edukado de la Deputita ĉambro de la Parlamento de la Ĉeĥa Respubliko, kaj la aprobitajn simbolojn ties prezidanto enmanigas al la civitestroj dum aparta solena akto. Ekde la jaro 1991 ĝis la fino de la jaro 2004 estis oficiale atribuitaj 2430 blazonoj kaj 2720 flagoj.

Resumo ĉeflingva

Podle zákona o obcích č. 367/1990 Sb. všechny obce (města a vesnice) mají právo mít vlastní znak a vlajku, takže ty obce, které tyto symboly nemají, jsou oprávněny je získat. Návrhy obcí projednává Podvýbor pro heraldiku a vexilologii Výboru pro vědu, vzdělání, kulturu, mládež a tělovýchovu Poslanecké sněmovny PČR a schválené symboly předseda PS PČR uděluje starostům obcí při zvláštním slavnostním aktu. Od r. 1991 do konce r. 2004 bylo oficiálně uděleno 2430 znaků a 2720 vlajek.

Literaturo

- Exner P. (2005): *Vexilologický lexikon, vlajky obcí ČR (2004, 1.část, 2.část)*. – Středisko vexilologických informací. Hradec Králové.
- Klement J. (1979): *Heraldiko-veksilologio*. Terminaro en Esperanto. – EK La Progreso. České Budějovice.
- Mucha L. (1974): *Vlajky a znaky zemí světa*. 216 p. – *Geodetický a kartografický podnik v Praze, n.p.*
- Patera J. (2002): 30 jaroj de la Veksilologia klubo en Prago. – *MONATO*, oktobro 2002, p.23, Augsburg.
- Svoboda E. (1969): *České městské a obecní prapory*. – *Sborník přednášek z. 1. českého vexilologického kongresu, Hradec Králové.*

Adreso de la aŭtoro

S-ro Jiří Patera
U Ryšánky 1534 / 21
CZ – 147 00 Praha 4 / ĈEĤIO

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas vicprezidanto de Esperantista klubo en Prago kaj redaktoro de la klubo Bulteno. Li estas aparte interesata de diverslandaj flagoj kaj blazonoj, kiuj siaspece prezentas internacian komunikilon simile kiel piktogramoj, trafiksignoj kaj aliaj.

Pri la zoologia sistematiko

Rüdiger SACHS

Enkonduko

Jam en antikvaj tempoj zoologoj kaj botanikistoj klopodis por ordigi la vivestaĵojn – bestojn kaj plantojn – en sistemon, por orienti sin en la preskaŭ ne plu superrigardebla formoabundo de la animala kaj vegetala regnoj. Tiuspecan sistemon oni certe povas starigi laŭ tute diversaj vidpunktoj. Ekde la tempo de Charles DARWIN (1809–1882) kaj liaj antaŭaj kaj postaj “saniĝeoj” pri la teorio, ke ĉiuj vivestaĵoj evoluis el komunaĵo, oni tamen disdividas la plantojn kaj bestojn laŭ ilia “natura parenceco”.

Nia scio pri la filogenezo kaj, pro tio, pri la konjektebla samsanga parenceco multiĝas de jaro al jaro pro novaj malkovroj kaj ekkonoj, pruv- kaj konfirm-metodoj, precipe la gentefinilo. Malnovaj konceptoj estas anstataŭigataj per pli novaj, pli aplik-eblaj, do per “pli ĝustaj”. Tial la natura sistemo de la animala kaj la vegetala regnoj estas submetata al ŝanĝoj – ofte ne nur malgrandaj.

La opinioj (kaj interpretado de certaj komunaj ecoj kun selva “fina decido” pri deveno kaj origino) inter sistematike laborantaj zoologoj pri la aparteneco de certa bestoformo al certa parencecgrupo estas nek unuecaj nek stabilaj. Pri tio suferas ankaŭ la parazitologo, kiu okupiĝas pri anatomie kaj fiziologie tiuj “reduktitaj” specioj, ke ilia parenceco kun praspicioj (kiuj eble ankoraŭ ne vivis parazite) estas apenaŭ rekonebla. Parazitaj estas vivoformoj, kies “normalaj” organoj (laŭ kiuj kelkaj vivestaĵoj estas konsiderataj parencaj) malaperis, ĉar ne plu estas tezonataj ties funkcioj dum la parazita vivoformo.

Kadre de la vertebruloj la diferencoj kaj evoluaj ŝanĝiĝoj estas ofte nur malgrandaj aŭ ne tre gravaj por ŝanĝi la pozicion en la nomenklatura sistemo. Tamen ĉe antilopoj okazis tiom multe da tien-kaj-reen-nomado, ke oni kapskuas pri la forto de malsamaj opinioj. Ĉiuokaze jam de multaj jardekoj validas la disdivido de la vertebrulaj grupoj en 5 klasojn (fiŝoj, amfibioj, reptilioj, birdoj kaj mamuloj). Nur la “rondbuŝuloj” (*Cyclostomata*) intertempe estas forprenataj el la fiŝgrupo kaj starigataj kiel “senmakzeluloj” (*Agnatha*) apud la ceteraj vertebrulaj grupoj.

La ĝenerale akceptita ordiga skemo

Oni disdividas la animalan regnon en diversajn subregnojn, kaj tiujn ree en filonojn kaj subfilonojn. Al tiuj sekvas klasoj kaj subklasoj, ordoj kaj subordoj – de tempo al tempo nomenklature pliriĉigitaj (eble pro sciencula necerteco pri la preciza aparteneco) per super- kaj subgrupoj: do ekzistas superklasoj kaj subklasoj, superordoj, superfamilioj kaj subfamilioj kiel ja ankaŭ ekzistas subspecioj. En NPIV (2005, p.1047 sub „sistematiko“) troviĝas informaj kaj klare aranĝita listo de tiuj ĉi “ĉefaj sistematikaj kategorioj en zoologio” kun la diversaj branĉoj de la kunmetitaj vivulaj grupoj. Oni ne timu, ke tiu aranĝo baldaŭ denove ŝanĝiĝos: la grupoj estas firme kaj funde ellaboritaj de kaj por profesiaj sistematikistoj.

Por la science laborantaj fakuloj sufiĉas la kono de la sekvaj grupoj: **superfamilio**, **familio** kaj **subfamilio**, kaj por la interesato de sciencoj necesas scii pri **genro**, **specio** kaj **subspecio**. La genro/specio-paro estas fakte la “sciencano”, sub kiu estas identigebla sen iu ajn dubo ĉiu vivaĵo konata al la scienco – kaj tiu genro/specio-paro eĉ diferenciĝas de aliaj sciencnomenklaturaj grupoj per “aparta” skribmaniero. El tiu ĉi “laŭŝtupa sinsekvo” en la nomenklatura sistemo oni povas ankaŭ ekkoni la “laŭetapan evoluon” kaj, laŭsistematike kaj progressive, la laŭgradan rangordon – gradon post grado, rangon post rango. Tio helpas trovi la vojon fariĝi familiara kun la abundo de la vivomondo.

La sciencaj bestonomoj kaj iliaj skriboformoj direktiĝas laŭ Internacia Regularo pri la Zoologia Nomenklature, kiu estis rezoluciita dum la 15-a Internacia Kongreso pri Zoologio. La decidoj akceptitaj dum tiu kunveno estas devigaj por ĉiuj zoologiaj publikigaĵoj. Sciencistoj, kiuj verkas kaj publikigas en Esperanto, fakte ne rajtas escepti sin de tiaj devigoj kiuj tekstas jene:

La genronomo estas latina, latinigita aŭ latineca **substantivo en la singularo kaj ĉiam majuskla**, sekvata de la specionomo (kaj eventuale ankaŭ de la subspecia nomo). La speciaj resp. subspeciaj nomoj povas esti **substantivoj aŭ adjektivoj – sed estu ĉiam minuskle skribitaj**. La nomo de subgenro estas formata kiel la genronomo; ĝi povas esti aldonata, en krampoj, malantaŭ la genronomo. La nomoj de genrogrupoj aŭ triboj, subfamilioj, familioj kaj superfamilioj estas **substantivoj en la pluralo kaj skribiĝas majuskle**. Ili estas formataj el la nomo de iu en tiu grupo inkludita genro per aldono de la finaĵo “-inĵ” por genrogrupo, “-inae” por subfamilio, “-idae” por familio kaj “-oidea” por superfamilio. Estas dezirinde, ke ankaŭ esperantigita sciencano nomformo laŭeble spegulu tian internacie validan scienclingvan rekonilon.

La nomo de la aŭtoro, kiu priskribis kaj nomis iun antaŭe science ne priskribitan bestospecion aŭ grupon por la unua fojo, devas aperi – kun la jaro de tiu ĉi unua nomado – almenaŭ unufoje en ĉiu koncerna zoologia publikigaĵo. Aŭtonomo kaj jaro estu **sen krampoj** se la specio aŭ subspecio ankoraŭ estas ene de la sama genro, al kiu ĝin atribuis la aŭtoro, sed ambaŭ estu **inter krampoj**, se en la nuna publikigaĵo estas uzata alia genronomo. Plue, la sciencaj genraj, subgenraj, speciaj kaj subspeciaj nomoj estu presataj en aliaj pres-literoj ol la teksto. Por tio estas ĝenerale uzata la kursiva skribmaniero. La plej grava motivo por koni ilin estas, ke el ili estas formeblaj taŭgaj kaj internacie validaj nomoj en Esperanto.

Okazas, ke en la teksto aperas genro- kaj specionomo kursive, kaj en la bild-subskribo (por kiu ofte estas uzata kursiveco) aperas la sama nomo en normala, nekursiva skribo. Tio tute ne

estas frenezaĵo sed strikta sekvo de la nomenklatura regulo: “genro- kaj specionomo skribiĝu alilitere ol la ĉirkaŭa teksto”.

La scienca sistematiko en la praktiko

Se ordono estas tiom strikta kaj se la Zoologia Nomenklatura Regularo estas senŝanĝe akceptita de ĉiuj sciencistoj en la mondo, same por apliko en la naciaj lingvoj, la uzado de sciencaj nomoj en Esperanto estas deviga, tamen tikla afero. Por internacilingvaj sciencistoj gravas, ke la sciencaj nomoj estu kaj restu la bazo por la jam ekzistantaj (kaj ankoraŭ ne ekzistantaj) specionomoj en Esperanto, same por tiuj, por kiuj ne ekzistas tutmonde uzata “komuna nomo”, kiel ekz. la PIVaj ‘lavorso’ kaj ‘marhirundo’: por tiuj estas nepre bezonata ankaŭ la el la scienca nomo formitaj (same PIVaj) “prociono” kaj “ŝterno”.

Jam la “imago” pri iu ajn besto povas esti tre diferenca aŭ eĉ tute malsama en diversaj landoj. En Liberio (lando, kiu estiĝis en okcidenta Afriko post liberigo de la sklavoj el Usono) la novaj “liberaj Liberianoj” pruntis por la afrikaj sovaĝbestoj, tute fremdaj al ili, nomojn uzatajn en ilia usona hejmlando al “similaj bestospecioj”. En la lingvo parolata en Liberio oni trovas hodiaŭ *raccoon* (t.e. “prociono” el *Procyon*) por la civeto, *opossum* (t.e. “didelfo” el *Didelphis*) por la giganta rato *Cryce-tomys*, *elk* aŭ *reindeer* (t.e. ‘alko’ aŭ ‘rangifero’) por la pluv-arbara Bongo-antilopo *Boocerus bongo*. Ĉiuj liberiaj samnomportantoj havas nenion komunan kun la usonaj animaloj.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. R. Sachs

Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 E s c h w e g e / G E R M A N I O

<IsaeSachs@aol.com>

Priaŭtora informo

Veterinaro. Scienca kunlaboranto de Tropika Instituto en Hamburgo, Germanio. Malkovris kaj science priskribis pli ol dek novajn parazitospociojn de sovaĝaj bestoj en Tanzanio, Orienta Afriko. Profesoriĝis ĉe la zoologia fakultato de Hamburga Universitato pri parazitologio.

Daŭreco de protonio

Eizo OTSUKA

Estas konstatite, ke ekzistas “protonio”, protono-antiprotono-kombinaĵo, en parafrazo al “pozitronio”, elektrono-pozitrono-kombinaĵo. Ambaŭ estas materio-antimaterio-kombinaĵoj. Iliaj daŭrecoj sekve devas esti tre mallongaj, ĉar la elementoj tuj rekombiniĝos. Ni aŭdas tamen neniun raporton de mezurita daŭreco. Nur teoriaj valoroj por daŭrecoj de pozitronio ekzistas ⁽¹⁾, nome, $1,23 \times 10^{-10}$ s por parapozitronio, dum $1,4 \times 10^{-7}$ s por ortopozitronio. Ĉar diferenco inter pozitronio kaj protonio estas nur masoj de komponantoj, oni facile antaŭdiru la daŭrecojn de protonio jene:

$$\begin{aligned}\tau &= 2 \hbar / M c^2 \alpha^5 \\ &= 6,7 \times 10^{-14} \text{ s}\end{aligned}$$

por paraprotonio, kaj

$$\begin{aligned}\tau &= 9 \pi \hbar / 2 (\pi^2 - 9) M c^2 \alpha^6 \\ &= 7,6 \times 10^{-11} \text{ s}\end{aligned}$$

por ortoprotonio, respektive,

en kiu M estas protonmaso kaj α la fajstruktura konstanto. La protonmaso M estas anstataŭita de elektronmaso m en okazo de pozitronio.

Referenco

⁽¹⁾ Landau & Lifshitz: *Course of Theoretical Physics, Vol. 4, 2nd Edition, Quantum Electrodynamics*, V.B. Berestetskii, E.M. Lifshitz & L.P. Pitaevskii, p.372

Adreso de la aŭtoro

Prof. OTSUKA Eizo

Ueno Nishi 3-5-3, Toyonaka-ŝi

Osaka-fu 560-0011 / JAPANIO

<bpbco204@tect.zag.ne.jp>

Priaŭtora informo

Emerita profesoro kaj docento ĉe *Graduate School of Science, Osaka University, Machikaneyamacho 1-1, Toyonaka, Japanio 560-0043*